2,000 COPIES:

Filipina Esperantisto

Organ of the Philippines Esperanto Association

Published by the Executive Committee of the Philippines Esperanto Association at McCullough Building, Manila.

Entered at Post Office at Manila as Second Class.

Vol. II, No. 1(13) AUGUST, 1908 20 centavos

Filipina Esperantisto

CIUMONATA PROPAGANDILO

ADRESO:

W. H. Case, P. O. Box 326, Manila, Filipina Insularo.

Annual Subscription ..... ₱ 2.00
Unu peso (₱1.00) egalvaloras 1026 spesojn

JARA ABONO—EKSTERLANDE: Ni akceptas deksep inter naciajn respond-kuponojn.

NOTES AND COMMENT

This month the Fourth Annual International Congress of Esperantists took place at Dresden.

Owing to our being so far distant we shall have to wait a month before we can give details of this—to us as Esperantists—very important gathering.

We are however fairly well able to surmise, on the strength of the assurances of our German samideanoj, that the Fourth will not fall short of the exceptional successes of the previous congresses—in fact everything points to Dresden eclipsing them.

During the month a club has been formed in Manila that will do much to aid the Association directly and indirectly. Only members of the Association who have some knowledge of the language are eligible. A fundamental regulation is that absolutely no other language than Esperanto shall be at any time permitted to be spoken in the Club building. This apparently stringent by-law is the *ipse-facto* of its founding, the idea being to give conversational practice.

The entrance fee is ₱25.00. ₱500 is to be spent in furniture and books. Further particulars will appear in our next issue. In the meantime we will be pleased to answer inquiries directed to us by those who may favorably view the main idea of the new club. Certainly the monthly fee of ₱5.00 will be well counterbalanced by the practical learning of the language provided.

Dr. Yemans has presented to the club several series of "Delmas' Auxiliary Pictures" made in accordance to the Regulations issued by Ministry of Education in France, for the teaching of Esperanto. He noted the successful use of them at Lussingen whilst there as the guest of the Lussingen Esperanto Group.

Mr. C. N. Lamb, the superintendent of Iwahig Penal Colony, passing through Manila last week, called upon the Executive Committee of the P. E. A. to enquire what elementary Esperanto text books in the native dialects were published or being prepared. He expressed himself as being desirous of making an experiment of Esperanto as a means of communication in prison routine at the Colony where about a dozen diverse languages have to catered to.

Mr. Lamb was of the opinion that even with illiterates the language is many times easier to acquire than any living tongue owing to its lack of irregularities, its minimum vocabulary, and the simple system of word-building from roots. In the case of the Spanish-speaking natives, more or less educated, the language would of course present still less difficulties.

He intends to rely on the three priests stationed in the Penal Colony to carry out the initial instruction and will give premium to those prisoners who make the most rapid progress that will enable them to act as instructors to the others.

Apart from the object in view of facilitating intercourse between the prison authorities and prisoners we fancy that it will be acceptable as a break in the monotony, at least to many, if not to all the inmates.

Digitized by Google

Padre Serra, whose portrait appears in this issue, is very active on behalf of the movement in Cavite, and we soon hope to report a very flourishing society there. The personality of the reverend father, so frankly openhearted and sympathetic, together with his enthusiasm for the Cause, is a very solid gain for Esperanto, which the Cavite residents declare we cannot overestimate.

o

We have still a few copies left of *Tra la Mondo* (July) containing Commissioner Shuster's article "Lernejoj Publikaj en la Filipina Insularo." Price 30 centavos.

o

An official invitation to visit the Prague Exposition has been extended to the Esperantists gathered at Dresden after the termination of the Congress.

o

During the month two members of the Executive Committee visited Calumpit, Bulacan, where a propaganda meeting was held. Over a hundred persons were present and much interest was shown in the movement.

It demonstrated what a large field there is in the provinces if the Association could find means of sending representatives to systematically visit the different towns.

o

Check Books printed in Esperanto with International Money Unit (spesmilos) table and national currency equivalents are being supplied by Internacia Scienca Oficejo, Geneva. The place where the bank's name should appear is left blank to be filled in by drawer.

o

RED CROSS

At Kotzschenbroda, Saxony, a course in Esperanto has been opened for the bearers and hospital orderlies of the Saxon Red Cross. General Schmidt is an enthusiastic attendant at the lectures.

Major Clandon, 3rd Batt. 51st Inf. (France), has induced Lieut. Bayol to inaugurate a course in the language to the graduates and men of this Battalion.

o

PUBLISHERS' NOTICE

Our Congress Number

Due to the interest that is manifested in the Dresden Congress we shall make our next issue a double number, and as it is impossible to get a full account of the proceedings before October, this enlarged issue will not be published until the middle of that month and will take the place of the September and October numbers.

o

TURISMO

Ilustriaj Gvidlibroj

En la nuna tempo kiam nia lingvo disvastiĝas rapidege en pli kaj pli grandajn rondojn de la tuta globo, la publiko komencas lerni Esperanto ne tiom por apogi aferon idealan al kiu ili sentas simpation, kiom por konatiĝi kun afero, kiu povas baldaŭ, se ne jam nun, doni al ili praktikan utilon. Multaspekaj estas la aplikadoj de Esperanto, ĝi taŭgas por komercò, scienco k.t.p, k.t.p. kaj montras sin precipe utila por la turismo. Estas ja tro konate, ke multaj personoj, sentante deziron multe vojaĝi, ne kuraĝas iri fremdlanden, kie oni parolas lingvon tute ne konatan de ili. Kontraŭe, sciante lingvon ĉie komprenatan de granda nombro da homoj—kaj ni trankvile povas diri tion pri Esperanto—ili kuraĝe prenas sian lokon en la fremdlandena rapidvagonaro, ne riskante ludi la rolon de surdmutulo en la alia lando. La jus fondita Universala Esperanto-Asocio sendube donos tre grandan kontingenton da aliĝontoj al nia afero, plifaciligante per sia turisma fako la peresperantan vojaĝadon. Oficejo de U. E. A. baldaŭ troviĝos en ĉiu pli granda urbo, kaj la konsuloj kaj iliaj helpantoj ĉiamaniere klopodos por agrabligi la restadon al la fremduloj.

La eldonado de Esperantaj gvidlibroj estas la plej efica rimedo por utili al la kreskado de l' turista fluo; multaj tiaj vergoj jam aperis, kaj ni esperas ĝojigi niajn legantojn anoncante la aperon de la gvidlibro ilustrita pri Kopenhago. Ni esprimas nian plej sinceran dankon al "Politiken" pro ĝia tre malavara helpo al la eldono de l' verketo, per ĉi tio la gazeto denove pruvis sian grandan intereson al nia afero.

La gvidlibro enhavas praktikajn turistajn informojn pri hoteloj, restoracioj, tramvojoj, k. t. p., k. t. p. en Kopenhago, krom priskribo de la plej belaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo.

Espereble niaj eksterlandaj amikoj per legado de l' libreto fariĝos tiom allogitaj de nia urbo, ke ili baldaŭ venos por viziti ĝin kaj la danajn samideanojn, kiuj ilin plej kore akceptos.

La gvidlibro estos alsendata al ĉiu, kiu sendis unu internacian respondkuponon po dezirita ekzemplero al la Esperanto Oficejo Kr. Bernikowsgade 1, Kopenhago. —"Dana Esperantisto."

Digitized by Google

JUBILEA EKSPOZICIO

De distrikto de komerca kaj industria ĉambro

EN PRAHA (PRAGUE), MAJO-OKTOBRO, 1908


Por honorigi la sesdekan jaron en regado de Lia Imperiestra kaj Reĝa Majesteco Francisko Jozefo I.

La ekspozicio konsistas el jenaj partoj:

A. PARTO ĜENERALA.—Ekspozicio de la komerca kaj ĉambro.—Subtenado de industrioj malgrandaj kaj artistaj.—Urbaj ekspozicioj.—Komercaj kaj industriaj korporacioj.—Institutoj por bono de laboristoj kaj oficistoj (Sociala politiko).—Komerca kaj industria instruadoj.—Financaj, kreditaj, asekuraj institutoj.—Fervojoj, vaporŝipoj, pontoj kaj vojoj.—Telegrafoj kaj telefonoj.—Arĥitekturo.—Inĝeniereco.—Konstruado.

B. PARTO INDUSTRIA.—En distrikto de komerca kaj industria ĉambro en Praha estas reprezentataj preskau ĉiuj industriaj fakoj de austria monarkio, inter kiuj multaj per la plej eminentaj fabrikejoj. Ekzemple en la distrikto estas: la plej granda sukerfabrikejo, la plej granda alkohol destilejo en Austrio, la dua plej granda bierfarejo, la plej granda rafinejo de mineralaj oleoj, la plej grandaj fabrikejoj por konstruado de maŝinoj, de agrikulturaj maŝinoj, de vagonoj, la plej grandaj fabrikejoj por fabrikado de vakstukoj, de tolajo, de ĉapeloj, k. t. p. el tuta monarkio Austria.

La ekspozicio estas lokita en la plej granda kaj bela parko en Praha (Stromovka), en pentrinda ĝardeno, ĉirkauita per la rivero kaj montoj plena da aleoj kaj arbaj grupoj, riĉa per ĝardenaj ornamajoj.



TUROJ DE ĈTONA PONTO, PRAHA (PRAGUE)

PRAHA, ĉefurbo de regno Bohemujo, estas unu de la plej belaj urboj de la mondo pro sia pentrinda situacio kaj riĉeco je historiaj memorajoj. En aŭstria monarkio ĝi estas la dua en vico de urboj, havante pli multe ol 500,000 da loĝantoj.

This Exposition has been much advertised in languages of adjoining countries and has also issued announcements printed in Esperanto, thus being probably the first large concern of this nature to adopt the international language for the purpose of advertisement. We have extracted the above from one of these bills received from the Chamber of Commerce and Industry, Prague.

Digitized by Google

GOETHE'S IPHIGENIA IN TAURUS

Presentation in the famous Royal Opera House of Dresden

with special permission of the King of Saxony.

by Emanuel Reicher

THE FIRST PLAY IN THE ESPERANTO LANGUAGE

given by a company of eminent professional actors



EMANUEL REICHER
aranĝis la unuan prezentadon de *Ifigenio* en Esperanto kaj ludis la rolon de TOAS



HEDWIG REICHER
ludis la rolon de IFIGENIO



BRUNO DECARLI
ludis la rolon de ORESTO

La *Germana Esperantisto* (Julio) diris pri l'aranĝo de tiu ĉi prezentado. "Ke la tuta aranĝo de la dramo kaj de la sceno estos nove farita laŭ la plano de S-ro Reicher; la aktoj estos interligataj per muzikpartoj el la fama, samnoma opero de Gluck. Entute la prezentado estos—ne nur pro la lingvo—io artiste plej originala kaj solena."

TEMO DE IFIGENIO EN TAURIDO

La legendo pri Ifigenio apartenas al la religio kaj al la historio de Grekujo kaj la ĉefpersonoj kiuj ludas rolojn en ĝi, estas famekonataj. Ifigenio estas grekino, filino de la konata heroo Agamemnono, kiu kondukis kaj estris la grekan militistaron, kiu iras al Trojo por reporti la forrabitan Helenon, plej belan virinon en la tutmondo.

Pof la milito Agamemnono kolektis la tutan militistaron el la diversaj landoj de Grekujo en la haveno Aŭlido; ĉar jen diras Eŭripides:—

"Car tien grekan aron el da ŝipoj mil'
Kolektis Agamemnon', la estro de l' milit',
Volante ke la grekoj forportu for de Troj'
Venkkronon kaj ekvenĝu perfidon de Helen',
Montrante de favoro al frat' Menelaos'."

De Aŭlido la milo da ŝipoj devas transporti la armeon trans la maron al la kontraŭa bordo de Azio, kie staras Trojo. La dioj tamen sin montras malfavoraj; la ŝiparo estas retenata longan tempon en Aŭlido pro manko de konvena vento. Oni devas memori, ke en tiu epoko oni nemulte komprenis kiel veturi per veloj sur la maro, kaj la velŝipoj, kiujn oni tiam posedis, kapablis nur uzi venton, kiu venas rekte post aŭ preskaŭ post la veloj.

Digitized by Google

Kompreneble, la tuta militantaro furiozas, ĉar ĝi estas tenata kontaŭvole en tiu loko, kaj jam post nelonge oni murmuras, ke la prokrasto okazas pro iu ofendo kontraŭ la dioj. En la armeo sin trovas divenisto de la aŭguroj, pastro de la dioj, simile je la "ĉefpastro por la armeo" en nia tempo. Lia nomo estas Kalĥas. Li certigas al la reĝo Agamemnono, ke la dioj ofendiĝis pri li.

Agamemnono kompreneble volas purigi sin antaŭ la dioj por ke la milito prosperu. Sed Kalĥas proponas al la reĝo teruran sorton. Aperas el la esploroj de la ĉefpastro, ke Agamemnono promesis iun jaron, ke li oferos al la diino Diano (Artemiso) la plej belan idon, kiu naskiĝos sur liaj bienoj en la printempo. Okazis, ke la edzino de Agamemnono naskis en tiu sama printempo filinon Ifigenion. La pastro Kalĥas postulas la oferon de tiu filino konstatante, ke la diino Diano volas tion kiel plenumon de la reĝa promeso. Unue la reĝo ne volas, sed en la fino li konsentas, ke oni venigu Ifigenion al la milita tendaro, pretekstante, ke oni fianĉigos ŝin kun la greka ĉefulo Aĥilo. La ruzo efektiviĝas, la patrino Klitemnestro permesas la fortiron de sia filino. Oni metas Ifigenion sur la altaron, kaj la pastro jam tenas sin preta por buĉi ŝin, kiam subite, la diino Diano ŝin tiras el sub la tranĉilo, kaj metas cervidinon sur la altaron anstataŭ Ifigenio. Ifigenio estas forportata de la diino en la templon de Diano en Taŭrido. La loko kie staris tiu templo estas nun nomata Balaklavo en Krimo (Crimea), sur la norda bordo de Nigra Maro en suda Rusujo. Alveninte en la templon Ifigenio fariĝas pastrino de la diino. Nu, estas kutimo en tiu lando, ke oni buĉas la fremdulojn, kiuj venas aŭ jetiĝas de la maro sur la bordon. Per sia influo ĉe la reĝo de la lando, Ifigenio jam sukcesis ĉesigi la plenumon de tiu kruela leĝo. Sed jen subite venas embaraso.

La reĝo enamiĝas kun Ifigenio kaj trovante, ke ŝi pro sia sopiro por la hejmlando Grekujo ne volas edziĝi kun li, diras al ŝi, ke de nun li jam ne povos fordeteni sian popolon de la buĉo de fremduloj, kiuj venos al la bordoj de la lando; ke ŝi de tiam devos fari sian oficon, dediĉante la viktimon al la diino. Kaj io stranga okazas!

En Grekujo, la patro de Ifigenio revenas post dek jaroj de Trojo. Lia edzino Klitemnestro en lia foresto alprenis alian edzon kaj jam frue informiĝinte, ke la reĝo revenas, la geamantoj mortigas lin tuj post lia eniro en lian palacon. La krimo ne restas sen puno. Elektro, alia filino de Klitemnestro kaj Agamemnono, instigas sian fraton Oreston al la mortigo de la patrino Klitemnestro kaj ŝia amanto.

Oresto do mortigas ambaŭ ilin. Sed en la opinio de la grekoj estas treega krimo mortiĝi eĉ kriminalan patrinon, kaj tial la Furioj—alivorte, la riproĉanta konscienco—persekutas Oreston. Por havi ripozon je la Furioj, Oresto petas konsilon de Orakolo de Apolono, kiu respondas: "Reportu la fratinon el ŝia templo en Taŭrido."

Ĉar Diano estas la fratino de Apolono, Oresto kredas, ke li devas reporti al Grekujo bildon de Diano, kiun li trovos en ŝia templo en Tuŭrido.

Oresto do forveturas sur ŝipeto kun la fidela amiko Pilado—ĉar Oresto kaj Pilado estas nedisigeblaj amikoj—modela tipo de la amikeco. Malfeliĉe ventego furioas sur la Nigra Maro kaj renversas ilian ŝipeton. Oresto kaj pilado estas ambaŭ jetataj sur la malgastaman bordon de Taŭrido.

Tie tre baldaŭ la loĝantoj de la lando trovas ilin kaj, laŭ la ordono de la reĝo, ili estas kondukataj al la templo de Diano, por ke Ifigenio oferbuĉu ilin al la diino. Furioza pro sia kaptiĝo, Oresto deliras freneze kaj la amiko Pilado lin konsolas. En la komenco Ifigenio ne rekonas sian fraton, nek li ŝin, sed poste per la vortoj de Pilado, ŝi komprenas, ke estas la frato Oresto kaj ties tutviva amiko, kiujn ŝi devos oferi. Tiu buĉo, antaŭe malfacilega, nun fariĝas neebla, kaj dum la amikoj reciproke sin proponas, por ke unu restu por morti dum la alia forkuros, Ifigenio elpensas rimedon por liberigi ilin kaj sin mem kaj por ebligi ilian revenon en Grekujon.

Ŝi petas de la reĝo prokrastojn pretekstante, ke ŝi devos purigi la bildon de la diino, kiu malhonoriĝis per apudesto de la pli aĝa viktimo (Oresto), kiun ŝi trovis esti mortiginto de parenco. En la intertempo, Pilado esplorinte, trovas ke la ŝipeto efektive ne dronis, ke ĝi estas jam en haveneto kun la ŝipanaro, tute preta por la foriro. Sed la pura animo de Ifigenio estas turmentata, ĉar ŝi devas trompi per ruzoj la reĝon de la lando, kiu kondutis bone al ŝi. Ŝi iras do al li, kaj forta impulso de ŝia koro devigas, ke ŝi forlasu la ruzon kaj konfesu ĉion honeste al la reĝo.

Konsternate en la komenco pro la pereo de sia espero, la reĝo fine ne rifuzas plu kaj permesas, ke la grekino reiru al sia lando kune kun la frato kaj la amiko, kiuj ambaŭ estas karaj por ŝi —"B. E."

Digitized by Google

MIA LOĜADO EN LA ARBAROJ—Rememoroj

Antaŭparolo al serio da priskribaj artikoloj pri la Filipinaj lign-kreskaĵoj verkotaj de S-ro S. Garcia Roxas, kiuj aperos de tempo al tempo en tiu ĉi gazeto, ilustritaj kun fotografaĵoj.



S-RO S. GARCIA ROXAS

Kelkaj jaroj jam pasis, sed mi ankoraŭ memoras kun plezuro la veturon, kiun mi faris al la arbaroj de Baler kien mi iris kiel arbaristo por ellernadi la vegetaĵaron ne bone konatan de tiu regiono.

Kiaj belaj estas ĝiaj altaj montoj tute kovritaj de kreskaĵoj! Kiaj belaj ĝiaj arbaroj plenaj je lignoj grandvaloraj!

Kiam mi alvenis Baler'on mi loĝis en la kvartalo Cemento kiu kuŝas apud la marbordo, tri mejlojn en la sudo de Baler kaj proksime de bela arbaro kie mi trovis multe da leguminaĵaj lignoj de tre granda valoro. Tiu estas la regiono de la kreskaĵoj Sindora, tiel kiel la regiono de la Vitex estas la suda parto de Camarines.

Mia ĉateco al la kreskaĵoj faris ke mia ĉeestado tie, estu tre agrabla, ĉar ĉiam kiam mi ektrovis novan specon da ili mia ĝojo estis tre granda. Malĝoja kaj malriĉa estas la urbeto Baler, sed belaj kaj riĉaj estas ĝiaj arbaroj! (Mi loĝadis tie tri monatojn sed tiel bone mi ilin pasigis ke mi ankoraŭ memoras tiun tempon kun vera ĝuo.)

Se estas ravaj ĝiaj montoj, estas ankaŭ ĉarmaj, la vastaj ebenaĵoj kien mi trovis multajn arbarojn plenaj je la tre ŝatata ligno Narra.


Mi skribis du artikolojn hispane pri miaj arbaraj laboroj. Ilin mi legis en la Akademio de Arĥitektoj kaj Termezuristoj laŭ peto de miaj samakademianoj. Miaj verkoj estis titolitaj "La Leguminosee lignoj" kaj "La Dipterocarpee de la Filipina Insularo." En la du artikoloj mi skribis pri mia veturo al Baler precipe en tiu unua kie mi faris priskribon pri la Pterocarpus kaj Sindora. En la dua verko mi priskribis detale miajn veturojn al la arbaroj de Bataan kaj Zambales, kien mi trovis la plej grandan nombron da lignoj el la familio Dipterocarpee.

Mi loĝis en la arbaroj de Zambales kiam mi havis la unuan sciigon pri Esperanto, kaj de tiu tempo ekkomencis mian ŝatecon al tiu ĉi lingvo internacia. Mi plezure memoras tiun tempon! Mi tiam troviĝis en la arbaroj de Botolan en la regiono de la lign-kreskaĵo Pinus Merkusii, kiam mi ricevis broŝuron! Ĝi estis verkon skribitan de franca esperantisto. Tie mi ankaŭ ricevis poŝtkarton alvenitan el Manila kiu sciigis min pri la disvastiĝado de Esperanto en la tuta mondo.

Kelkaj jaroj jam pasis, sed mi ankoraŭ havas agrablan rememoron de tiu veturo al la arbaroj kaj de mia unua sciigo pri la internacia lingvo Esperanto.—*S. G. R.*


S-ro P. Corret, 12, rue de Vergennes, Versailles (S.-et-O.), Francujo, verkas nun tezon, por medicina doktoriĝo pri tiu *ci* temo: Utileco kaj ebleco de la alpreno de helpa lingvo internacia en medicinon (internaciaj medicinaj kongresoj, ruĝa-kruco, bibliografiaj sercadoj por medicinaj verkoj, k.t.p.). Oni facile komprenos, kiom grava estos tiu verko por nia propagando en medicinaj rondoj kaj kian grandan influon ĝi povos havi, estante oficiale akceptita de la Pariza Fakultato de Medicino. La verkanto petas de *ciulandaj* esperantistaj medicinistoj, ke ili bonvolu helpi al li, alsendadte *ciaspecajn* informojn kaj sciigojn pri la suprecitita temo.

Digitized by Google




I.—FLANKA VIDAĴO

Usona submarŝipo "Shark" enakviganta en la golfeto de Manila, F. I., apud Cavite, la 9an de Julio, 1908a, de la flanko de la Usona vaporŝipo "Caesar" kiu ĝin alportis de Usono.



II.—MALANTAŬA VIDAĴO

Digitized by Google



III.—ENIRANTA EN LA MARO—

THE LAUNCHING OF THE TWO SUBMARINE BOATS FROM OFF THE U. S. COLLIER "CAESAR" LAST MONTH

SNAPSHOT PHOTOS SHOWING THE "SHARK" AT DIFFERENT STAĜES.

These boats were brought to Manila from the States. At Brooklyn yard, they were hoisted aboard U. S. S. "Caesar" by means of a floating derrick, and then securely lashed to the main deck abaft the engine housing on double cradles; one for the voyage having its bearing blocks intermediate of those of the launching cradle. The strain on the deck was relieved by heavy shoring timbers carried through to the upper floor of the ship's bottom, and also sustained by the transverse bulkhead which extends athwartship just under the center of the cradles.

The Shark was made fast on the port, and the Porpoise on the starboard side. They never budged during the long voyage, notwithstanding the sometimes heavy seas and consequent slight rolling of the collier.

The launching ways were laid out about six feet clear of the ship's side on the usual drop angle, giving a sheer fall of less than seven feet, and these were firmly braced and rigidly tested, the cradle was then tipped and gently passed down the ways into the water an angle of less than 25 degrees a-starboard, the natural list, rebounding easily to port, and then settling on an even keel.


The construction of these two boats was authorized in 1900, and they went into commission in the autumn of 1903. Each is 63½ feet in length, by 11¾ maximum diameter, with a weight of 120 tons. They have been brought here to form part of the defences of Manila Bay. Two other and larger submarines are ready to be transported in a similar way.

The pictures were kindly furnished by Mr. A. A. Anderson of Cavite.

Komencante je la 1ª de Septembro aperos en Holando monata gazeto sub la titolo: "La Holanda Pioniro," kiu unuafoje plenumos la rolon de oficiala organo de la Holanda Societo Esperantista "La Estonto estas Nia.

Rilate al tio, oni penos fari la gazeton kiel eble plej interesa por eksterlandanoj: Ĉiu numero enhavos i. a. rubrikon sub la titolo "Fremdula Paĝo," en kiu oni donos ĉiuspecajn informojn pri Holando, ĝia pentrinda regiono kaj ĝiaj multaj vidindaĵoj (museoj, k. t. p.), dum oni organizos ĉiuspecajn konkursojn, por kiuj estos destinataj, kiel prezoj, diversaj Holandaj artobjektoj, kopioj laŭ famaj Holandaj pentristoj, albumoj kun Holandaj pejzaĝoj, k.t.p.

Digitized by Google



(IV) KAJ DU SEKUNDOJ POSTE

LA FRATO

(El hispana verkisto Manuel Carretero)

Tie, en dezertą monto da kratagoj kaj dornarbetaĵoj, iradas Aleppeo kaj la infano Erapo. Aleppeo estas maljuna: li havas blankan barbon, liaj okuloj estas senvidaj kaj lia korpo pene moviĝas je paŝoj mallertaj, malrapidaj... La infano kaj unu bastono helpadas lin en lia marŝado.

Estas la horo de l' krepusko; la suno subiradetas la supron de la monto, kaj Aleppeo kaj Erapo estas veninte el la vilaĝoj kuŝantaj sur la monteto por peti almozon. Sed hodiaŭ iliaj fratoj ne estis kompatemaj, kaj nek mizerajn supojn, nek malmolan panpecon, nek ekgluton da vino ili donis al maljunulo kaj al la infano.

Ili estas revenantaj al ilia pajlotegita dometo.

La dometo staras ĉe la malsupro de alia altaĵo, kie Aleppeo, en tagoj jam malproksimaj, posedis riĉecon kaj estis feliĉa.

Ili vojiradas. La maljunulo sentas lacecon ĉia ĵoje pli grandan; li haltiĝas ĉiu momente, malkuntiras la kapon, pene spiras, karesas la infanon kaj ree marŝas...

—Aveto, ĉu vi estas malsata?

—Ne, infano mia; mi suferas pro vi!

—Ne maltrankviliĝu, ĉar baldaŭ ni alvenos la dometon kaj ni manĝos la panon de l'lupo.

—La lupo!... Ĉu mi audas ĝin, kaj atingas min la helpo de l'fidela amiko, kiam kiel aliaj vesperoj, el malproksime ĝi antaŭsentas nian revenon? Ne! hodiaŭ nek mi aŭdos la lupon, nek mi manĝos ĝian panon!... Ankoraŭ estas longa la vojo trairota, kaj jam mia korpo mortiĝas!...

—Aveto mia, ne diru tiujn vortojn tiel malgajigajn ke ili plorigas min! Vi estas la sola estaĵo kiun mi havas en la mondo, kaj se vi iam forlasus min...!

—Vi prave parolas, infano mia; kion vi faros kun via amemo kiam mi ne ekzistos plu? Al kiu vi konfidos ĝin se la homoj estas malbonaj kaj ne sin amas unu la alian?

—Ni turnu nin, aveto mia, al nia dometo; nur kelkajn momentojn kaj ni estos tien. Ĉu vi ne aŭdas?

—Ne, Erapo; mi aŭdas nenion, nek vidas, nek sentas, kaj mia animo, iom post iom liberiĝas el tiu ĉi facilrompebla tera envolvaĵo...

—Aveto! aveto!... Leviĝu; mi vin kunportos en mia brakoj. Parolu min pri viaj geinfanoj, pri la patrineto mia... Ĉu vi ne audas min?... (li ploras) Sinjoro, kion mi faris kontraŭ vi por ke mi suferadu tiujn ĉi turmentojn!... Aveto!...

Digitized by Google

Mi vokos la virojn kiujn ĉi tie proksime pasas post la tagaj laboroj.

—Ĉi tien, bonkora viro!!... Estas mi, Erapo! (Sajnas ke li ne konas min). Erapo kun la maljuna Aleppeo, kiu mortiĝas pro malsato! Venu helpi min, frato, kaj Dio rekompencos vin, hodiaŭ pli ol neniam!...

Kaj post nelonga daŭro, estis aŭdata voĉo kiu tie malsupre, el la ebenaĵo, ekkriadis:

—Ha, estas vi! Ĝis kiam do vi lasos nin trankvilaj? Pano por la lupo! laboradu kaj penadu, almozulo!

Poste, la kamparano spronis lian rajdatan azenon kaj perdiĝis je l' vido tra la vojetoj de la vilaĝo.

La maljunulo estis mortiĝinta.

En la malproksimaĵo tre klare aŭdiĝis la sonorado de l' Anĝeluso, kaj pli proksime, la sonoriletoj de ia brutaro kiu revenis al vilaĝo; kaj ĉe la hela blueco de l' ĉielo ekkomencis aperadi la stelojn.

La infano ploradis kisante la korpon de l' maljunulo.

—Bona virino: supreniru la deklivaĵon, ĉar mia aveto mortiĝis!

—Kiu vokas min? Ha, estas vi, Erapo! Pano por la lupo... Laboradu, malfeliĉulo.

Kaj pasis, kaj ree pasadis multe da viroj kaj virinoj tra la vojoj de la vilaĝo, kaj ĉiuj respondis la samon: Pano por la lupo! Laboradu, malfeliĉulo!

—Kial, Dio mia, tiom da malfeliĉo, kaj kial mi ne ĉesiĝis ekzisti kaj suferi kune kun mia avo!

Kaj la infano restadis tien ploranta dum multajn horojn kaj tra la nokta silento, ĝis tre malproksime, oni daŭre aŭdis liajn plendajn ploregojn.

Subite, ĉe la najbara rivereto la ranoj interrompas ilian grakadon kaj la kanoj forte balanciĝas; kaj al la monto eksupreniras io nigra, kiu dezirege kaj korpreme paŝas al loko kie troviĝas la infano.

Jam la du estas kune: ili ame ĉirkaŭpremas unu la alian; la infano ploras samtempe pro ĉagreno kaj ĝojo. Ambaŭ kisadas la maljunulon, jam nepre malvarman, kaj ili kovras ĝin kun amaso da tero en fosaĵo tre profunda.

—Ni iru hejme, Loubin, frato lupo, por kune ĉagreni...

Sed la lupo ne moviĝas; ĝi kriegas kaj ne apartigas ĝiajn okulojn, brilantaj kiel fajraj karboj, je la monto la plej alta de tiu valo.

Erapo karesas Loubin'on kaj tiras ĝin per la snurero kiun la sovaĝa besto portas ĉirkaŭ ĝia kolo. Ĉio vane; la lupo ne volas iri al la dometon kaj daurigas kriegante: sed ĝi jam marŝas kaj gvidas la infanon al la plej alta monto...

Mi bone faris—parolas Erapo—prenante vin kun mi, kiam novnaskita, sen patrino, en via refuĝejo mem vi estis pereonta, kaj mi dividis kun vi mian panon akiritan per almozo, mia nobla frato. Jes! ni supreniru la monton el kie la homoj forkuras, kaj ĉe tiu tero, virga je ĉiu malvirteco, ni ambaŭ vivadu la puran ekzistadon!

Tradukita de F-ino F. ZAMORA.

NO AMBIGUITY IN ESPERANTO

Japan Demands that Esperanto be officially used at the Peace Congresses.

The Japanese Peace Society have instructed their delegate to speak in Esperanto, and to give notice that unless Esperanto is permitted no future delegate will be sent by them.

Extract from the Espero Pacifista (July)

La Japana Societo de Paco kaj la Japana Esperantista Asocio montris la parencecon de Esperanto kun Pacifismo, delegante samtempe D-ron Kroita, profesoron en la Universitato de Tokio, al la Esperantista Kongreso en Dresden kaj al la Kongreso de Paco en London.

En tiu lasta Kongreso, nia samideano, kiu estos la unua Japano partopreninto en Kongreso de Paco, intencas paroli nur Esperante, kaj deklari, ke nur nia lingvo ebligis la riprezenton de lia lando ĉe tia Kongreso.

Ni esperu, ke la blankrasuloj komprenos tiun lecionon el Ekstrema Oriento!

Digitized by Google

A letter from Mr. E. J. McMillan

OF STA. CRUZ, LAGUNA

Written after five or six weeks of study and thus demonstrating the facility of acquiring the language by anyone seriously devoting a few hours daily to study.



S-RO E. J. MCMILLAN

AUSKULTU! ĜUSTATEMPA AVERTO

Parolante, kelkajn vortojn pri la disvastiĝado de la internacia lingvo tra la tuta mondo, kaj vidante, ke ĝia forteco ĉiutage fariĝos pli granda, kaj pli potenca, mi kredas ĉiuj homoj, kiujn havas la bonŝancon ke ni nuntempe ĝuas, estas tre malsaĝaj se ili ĉiuj ne ellernas tiun ĉi belan kaj necesan lingvon, absolute necesa, ĉar antaŭ ol multe da jaroj ĝi fariĝas vere internacia, kaj ĝi fariĝas la vera ĉlosilo de interkomunikado inter la tuta homaro, kaj ankaŭ ĝi fariĝas la arbitraciisto de la aferoj internaciaj, kaj unvorte ĝi farigas interpaco de la malpacemaj naciaj.

Mi ne parolos tie ĉi vasta pri la grandan utilecon de nia kara lingvo, ĉar por ĉiuj homoj iomete kleraj, estas afero eksterordinare facila vide ke ĉiutage ĝi fariĝas des pli necesa, kaj tial mi konsilas ĉiujn legantoj de tiu ĉi artikoleton, elerni parkere tiun ĉi idiomon, tuj, kaj kun plena precizeco, kaj ankaŭ mi petas ilin helpu nin pri la disvastiĝado de Esperanto, en tiu ĉi anguleto de nia granda mondo, ĉar kiam, kiel mi jam diris, ĝi estas rekonuota kiel lingvo oficiale internacia, tiam vi ĉiuj diros al vi mem, kial mi ne lernis ĝin tiam, kune kun la aliaj? se mi tion farus, hodiaŭ mi povus parole ĝin bone kaj trovi pli bona ofico, aŭ almenaŭ paroli ĝin kun la alilanduloj kiujn mi ĉiutage renkontiĝas kiam nek mi scias ilian lingvon nek ili la mian, tial mi nun petas vin tutkore, estu unu el la unua ekkomenci lerni tiun ĉi belan kaj facilan lingvon, kaj mi certigas vin ke antaŭ ol du monatoj vi jam posedas ĝin pli bona ol mi nuntempe, ĉar mi nur estas studinta la lingvon kvin au ses semajnojn, kaj ankaŭ dum la dirita tempo, nur po du ĝis tri horoj ĉiutage, mi plenege komprenas ke mi ankoraŭ ne scias pli ol malmulte, sed tiu ĉi estas negrava, ni ĉiam devas fari kiel diras la saĝa autoro.

Kaj nin ne limegas la noktaj fantomoj
Nek batoj de l' sorto nek mokoj de l'homoj
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Chinese a difficult and cumbersome language

COMMERCIAL PROGRESS OF CHINA HINDERED THEREBY

Suggestions by Chinese students in Paris published in the "Sin si dzi."

"* * * mi opinias, ke se ni uzados la anglan aŭ alian nacian lingvon, tio ne estas tiel bona, kiel uzi esperanton; ĉar kvankam la angla estas pli oportuna kompare kun la ĥina, tamen ne estas plej konsilinde alpreni la pli bonan (ekz., la anglan), kaj poste penti dezirante fari duan ŝanĝon. Kiom pli saĝe estus, rekte alpreni la plej bonan, Esperanton, kaj per multa laboro fari ŝanĝon unufoje por ĉiam. La civilizacio de Eŭropo kaj Ameriko antaŭeneris jam dum kelkaj jardekoj, sed *Hi*nujo estas ankoraŭ nuumomente malantaŭ la aliaj, kaj la kialo troviĝas ĉe la lingvo. Ni deziras rapide antaŭeneri kaj atingi ĝis la aliaj; sed se ni ne forigos la malnovan ĥinan lingvon kaj uzos Esperanton, tio estos neebla.

Digitized by Google

LA REMEMORIĜO PRI LA MORTINTOJ

de D-ro Josê M.a G. Suarez

Ili nin ligas al tiuj, kiuj estis por ni ligiloj pli intimaj, ol ni kredis. Ĉiam, kiam sur la tombojn de la estaĵoj amitaj ni demetas florojn aŭ surlasas fali larmojn, leviĝas en nia konscienco la rememoro pri aliaj tagoj pasitaj en ilia kompanio; tiuj ĉi tagoj estas mortintaj, kaj certamaniere ni povus ankaŭ diri, ke estas mortinta parto da ni mem. Kio estas, se ne kadavroj, kiuj neniam reviviĝos plu tiuj feliĉaj momentoj dum kiuj, kun tremanta voĉo kaj korbatanta brusto ni ĵuris la unuan amon al la virino adorata, kiu jam malsupreniris al la mallumaj regionoj de la morto? Kio estas, se ne la akiraĵoj de la nekvietigebla malamiko de la vivo, la karesitaj deziregoj de la infaneco kaj la oraj sonĝoj de la juneco? Ni ne pasigas tiujn momentojn, nek sentas tiujn deziregojn, nek ĝuas tiujn sonĝojn sen la eluzo de parto da nia aktiveco, sen la laso en la vidvojo de fragmentoj de nia esto; mortantaj ni vivas, ĉar ĉiu horo, kiu forkuras kunportas kun si parton da nia energio, mortigas, neniigas porcion da la tempo antaŭdecidita por nia trapaso tra la mondo. La morto nin antaŭiradas, nin sekvadas, nin akompanadas, kaj enfiltriĝas en la plej intiman profundaĵon de nia konscienco ĉie semanta la ruinojn. Al ĉiu ago, kiun ni hodiaŭ efektivigas, respondos morgaŭ rememoro, kaj ĉiu rememoro estas tombo. Ĉiam, kiam ni rememorigas la mortintojn, ni rememorigas eĉ senvole la parton da nia esto, kiu mortis kun ili, la horojn vivitajn ĉe alia kompanio, la penojn kaj ĉagrenojn suferitajn kune kun ili, la laciĝojn elportitajn, kaj la ĝojojn partoprenitajn. Ĉiu portas interne de si panteonon, kies niĉoj pleniĝadas de tago al tago. La malforta lumo, kiu lumigas en nia animo la rememoraĵojn de la estinteco, estas kiel flamo trompema, erarlumo, kiu malkaŝas al ni la ekziston de ia tombo; tie estas entombigita je eterne iluzio aŭ espero, tie dormadas fantazio efektivigita aŭ malkontentigo suferita.

Ni rememorigu kun la mortintoj niajn proprajn agojn, kiuj jam finiĝis, kaj kiam ni rememoreme rigardas malantaŭe, se ni trovas ilin konformaj je la ordonoj de la Superega Leĝdonanto, ni diru kun trankvila animo: "Beati mortui qui in Domino moriuntur."

Tradukis el hispana lingvo,

EDGAR A. MCCLELLAN.



TOLEDO, HISPANUJO

"plej interesa, fortigita, malnova urbo, kie ni trovis la sindoneman D-ron Reyes, la Esperantan konsulon, kiu kondukis nin tra la mallarĝaj kaj kurbitaj stratejoj por montri al ni la mirindajn vidindajojn."

Eltirita el letero de D-ro Yemans.

Digitized by Google

RECENT PUBLICATIONS RECEIVED

"ALADIN; aŭ, LA MIRANDA LAMPO" translation by Major General Cox—(British Esp. Ass'n) Sm. 0.25.

"ESPERANTISTA KANTARO," 13 kantoj originalaj aŭ esperantigitaj por kvar voĉoj miksita (Karl Jost, Zurich) Sm. 0.40.

"SVEDA KANTARO," kun melodioj. compiled by G. Lofvenmark—(E. L.: Son Finn, Sala, Sweden) Sm. 0.40.

"MALNOVAJ PAĜOJ EL "LINGVO INTERNACIA," unua serio (Presa Esp. Soc., Paris) Sm. 0.75.

"IFIGENIO EN TAURIDO" Goethe;—translation by Dr. L. L. Zamenhof (Hachette & Co., Paris) Sm. 0.80.

"SUB LA NEGO" Taglibro de juna loĝanto de la Jura Montaro, translation by J. Borrel (Esperanto Verlag Möller & Borrel, 95 Prinzenstr., Berlin) Sm. 0.80.

"LA JUGO DE OZIRIS," H. Senkiewicz, translation by A. Grabowski.

"DIE ESPERANTO-SPRACHE AUF EINEM BLATTE," German propaganda leaflet 20 copies, M 50.

"EMPLOI EN BIBLIOGRAPHIE DE LA LANGUE INTERNATIONALE AUXILIARE ESPERANTO," (P. Renouard, 19 rue des Saints-Peres, Paris.)

"ESPERANTO SOCIETARO," Dec. 07, Sm. 0.60, (Esp. Centra Oficejo, Paris.)

"FORMULO PRI MALARMO," precipe relate al la Brita propono (Presa Esp. Soc., Paris.)

"SLOVAKOJ KAJ MAGIAROJ,"—(V. Riegel, Praha 11, 1687.)

"ABATEJO DE WESTMINSTER," Central Esperanto Institute, 17, St. Stephen's Square, Bayswater, London, W., 12 Sd.

Ilustritaj Poŝtkartoj kun Esperanto Teksto, J. Vohnout, Praha.

INTERNACIISMO KAJ PACIFISMO by D. J. Duroux (Espero Katolica, Ste. Radegonde, France,) Sm. 0.10.

LA SPRITULU, new monthly illustrated comic paper (R. Bresch, 31 Kornerstr, Leipzig) Sm. 1.20.



ESCURIAL

Digitized by Google

The Philippine Esperanto Association

FOUNDED, JULY 1907

HON. PRESIDENT
Dr. L. L. Zamenhof, (Warsaw)

PRESIDENT
Dr. H. W. Yemans, M.D., U.S.A.

VICE-PRESIDENT
Mr. Luis Llanso

EXECUTIVE COMMITTEE
The President, Messrs. Edgar A. McClellan, F. V. Freire, Benito Urrutia, and W. H. Case (Sec.-Treas.)

MEMBERS WHO HAVE JOINED THE P.E A. SINCE LAST ISSUE

637 Mr. Cornelio Francisco, 73 Arsenal, Cavite.
638 Mr. P. F. West, Box 401, Manila.
639 Lieut. G. F. Brady, 14th Inf., Camp Bumpus, Tacloban.
640 Mr. Ernesto Dethorey, 6 Sarria, Barcelona.
641 Mr. Emilio Santa Rita, Apalit, Pampanga.
642 Mr. Hy G. Santen, City Hall, Manila.
643 Mr. Manuel Alvarez, 78 Crespo, Manila.
644 Dr. Luis Ottofy, 64 Escolta, Manila.
645 Mr. Marcelino de Guzman, 129 Arsenal, Cavite.
646 Mr. Vicente Torres, 129 Arsenal, Cavite.
647 Miss Maria Candelaria, 78 Peñafrancia, Paco.
648 Miss Florentina Jose, 47 San Gregorio, Paco.
649 Mr. Carlos Defer, Ynchausti & Co., Manila.
650 Mr. Clemente Florentino, Notario Público, Calasiao, Pangasinan.
651 Mr. A. A. Anderson, Cavite.
652 Mr. C. H. Lamb, Supt. Iwahig Penal Colony, Palawan.
